

neĝo, kiujn li nomis “*Crimson Cliffs*“. Tio signifas “karmezinaj klijfoj“. Tiu ĉi malkovro konsiderinde konfuzis la sciencan. Kiel enordigi la ruĝan neĝon en la “Sistemo de la Naturo“ de *Linne*? Ĥemia neorganikaĵo aŭ organikaĵo? Meteorito? Polvo? De kie? Kio tie kolorigis? *Charles Darwin, Alexander von Humboldt, Justus von Liebig* kaj multaj aliaj sciencistoj okupis sin pri tiu ĉi problemo – eĉ teologoj, ĉar ruĝaj fenomenoj ja estas ankaŭ menciitaj en la Biblio...

Intertempe oni scias, ke temas pri la neĝoalga *Chlamydomonas nivalis*. Ĝiaj enzimoj kaj proteinoj dum malaltaj temperaturoj subtenas la maturiĝon de fromaĝo kaj la lavadon de lavaĵo. Kaj plue, la kolorigsubstanco bone protektas la algon kontraŭ fridigaj damaĝoj ĉar la ruĝa koloro estas tre efika kaptanto de “liberaj radikaloj“. Tio ĝojigas kaj medicinistojn kaj politikistojn. (2011-01-19)

La plej granda mamulo en Eŭropo

... estas la eŭropa bizon (*Bison bonasus*), kiu en antikvaj epokoj estis disvastiĝinta de Hispanujo ĝis la okcidenta Siberio – sed el kiu en la 19-a jarcento ekzistis ankoraŭ nur du sovaĝe vivantaj populacioj: en Kaŭkazo kaj en la praarbaro ĉirkaŭ *Białowieska*, regiono inter Pollando kaj Rusujo. Dum en Kaŭkazo jam komence de la 20-a jarcento ĉiuj bonasaj bizonoj estis forpafitaj de ĉasistoj, en Pollando vivis en la jaro 1914 ankoraŭ 727 tiuspeciaj individuoj. La plej multaj de ili tamen eniris la kuirpoton dum la unua mondomilito. La lasta ekzemplero estis en 1919 mortpafata.

Kiam en la jaro 1923 en Frankfurto ĉe Majno / Germanujo fondiĝis la “Societo por Savado de la Eŭropa Bizon“, oni trovis en zoologiaj ĝardenoj ne pli ol 54 ekzemplerojn. Hodiaŭ en la Nacia Parko “Bjaltovica erikejo“ en la orienta Pollando vivas preskaŭ tiom multe da bizonoj kiom tie vivis komence de la pasinta jarcento. Ili estas endanĝerigitaj precipe pro malsanoj, ĉar mankas al ili genetikaj multeco kaj diverseco. Ĉiuj pollandaj ekzempleroj ja devenis de la tri bizonoj, kiujn oni re-setligis tien en la jaro 1929. (2009-11-18)

La plej malgranda vivaĵo

... konata sur nia Tero vivas en 120 m da profundo en Atlantiko en vulkana regiono norde de Islando kaj havas la belan nomon “rajdanta pranano“, *Naniarchaeum equitans*. La pranano estas tre pretendeme postulema: ĝi ne eltenas oksigenon, kreskas kaj prosperas sole en bolanta akvo, kaj bezonas por sia bonfarto sulfuron kaj vulkanajn ga-

neĝo, kiujn li nomis “*Crimson Cliffs*“. Tio signifas “karmezinaj klijfoj“. Tiu ĉi malkovro konsiderinde konfuzis la sciencan. Kiel enordigi la ruĝan neĝon en la “Sistemo de la Naturo“ de *Linne*? Ĥemia neorganikaĵo aŭ organikaĵo? Meteorito? Polvo? De kie? Kio tie kolorigis? *Charles Darwin, Alexander von Humboldt, Justus von Liebig* kaj multaj aliaj sciencistoj okupis sin pri tiu ĉi problemo – eĉ teologoj, ĉar ruĝaj fenomenoj ja estas ankaŭ menciitaj en la Biblio...

Intertempe oni scias, ke temas pri la neĝoalga *Chlamydomonas nivalis*. Ĝiaj enzimoj kaj proteinoj dum malaltaj temperaturoj subtenas la maturiĝon de fromaĝo kaj la lavadon de lavaĵo. Kaj plue, la kolorigsubstanco bone protektas la algon kontraŭ fridigaj damaĝoj ĉar la ruĝa koloro estas tre efika kaptanto de “liberaj radikaloj“. Tio ĝojigas kaj medicinistojn kaj politikistojn. (2011-01-19)

La plej granda mamulo en Eŭropo

... estas la eŭropa bizon (*Bison bonasus*), kiu en antikvaj epokoj estis disvastiĝinta de Hispanujo ĝis la okcidenta Siberio – sed el kiu en la 19-a jarcento ekzistis ankoraŭ nur du sovaĝe vivantaj populacioj: en Kaŭkazo kaj en la praarbaro ĉirkaŭ *Białowieska*, regiono inter Pollando kaj Rusujo. Dum en Kaŭkazo jam komence de la 20-a jarcento ĉiuj bonasaj bizonoj estis forpafitaj de ĉasistoj, en Pollando vivis en la jaro 1914 ankoraŭ 727 tiuspeciaj individuoj. La plej multaj de ili tamen eniris la kuirpoton dum la unua mondomilito. La lasta ekzemplero estis en 1919 mortpafata.

Kiam en la jaro 1923 en Frankfurto ĉe Majno / Germanujo fondiĝis la “Societo por Savado de la Eŭropa Bizon“, oni trovis en zoologiaj ĝardenoj ne pli ol 54 ekzemplerojn. Hodiaŭ en la Nacia Parko “Bjaltovica erikejo“ en la orienta Pollando vivas preskaŭ tiom multe da bizonoj kiom tie vivis komence de la pasinta jarcento. Ili estas endanĝerigitaj precipe pro malsanoj, ĉar mankas al ili genetikaj multeco kaj diverseco. Ĉiuj pollandaj ekzempleroj ja devenis de la tri bizonoj, kiujn oni re-setligis tien en la jaro 1929. (2009-11-18)

La plej malgranda vivaĵo

... konata sur nia Tero vivas en 120 m da profundo en Atlantiko en vulkana regiono norde de Islando kaj havas la belan nomon “rajdanta pranano“, *Naniarchaeum equitans*. La pranano estas tre pretendeme postulema: ĝi ne eltenas oksigenon, kreskas kaj prosperas sole en bolanta akvo, kaj bezonas por sia bonfarto sulfuron kaj vulkanajn ga-